# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2011


*Kara Leganto, sendube vi jam scias de nia speciala mesaĝo, ke meze de Junio (la 17an) ĉesis bati koro de la fervora E-isto, kuracisto kaj nia modesta samideano Walter Cebulski. Por nia E-societo Li estas ne nur la kerna membro, sed ankaŭ – malavara mon-subtenanto. Restu Li en paco kaj eterne – en nia verda koro!* –La Redakcio

## Wladyslaw (Walter) Cebulski

*La 17an de Junio forpasis nia samideano, fervora E-isto, kuracisto Vladislav (Walter) Cebulski. Li naskiĝis en la jaro 1913 en Kupno, finis mezlernejon en Bresto, kaj de 1934 ekstudis medicinon en la Vilna Universitato nome de Stefano Batorij. Je la alveno de t.n. "liberigantoj" (german-sovetiaj okupaci-taĉmentoj) li estis malliberigita de nazioj. Nur en 1947 li iris al Bruselo kaj fariĝis diplomita kuracisto.*

*1953 – s-no Cebulski venis al Usono, fariĝis membro de la Ĉikaga societo de la polaj kuracistoj, kie Li estis kasisto, vic-prezidanto, prezidanto (1974-1989) kaj poste – Honora Prezidanto. La sekvanta grava aktiveco (kiel kuracisto-Esperantisto) estis la kontraŭ-diskriminacia agado por etnaj medicinistoj.*

*Krome, li estis la nia membro kaj aktive vojaĝis uzante la IL-on de E-o: lastatempe li vizitis la UK-ojn en Vilno kaj Bialistko (vd la foton). Antaŭ du jaroj nia E-societo ricevis grandan subtenon por propagandi la ILon. Samideano Walter, koran dankon! Kara Valtero-Vladislavo, dankon pro via E-agado, restu Vi en paco!* –Araneo



1913-2011

*Sed la vivo dauriĝas kaj agas La leĝo, laŭ kiu la nombro de E-istaro estas neŝanĝebla, almenaŭ en la ŝtato de Ilinojso: antaŭ nelonge tie ĉi aperis aktive fruktodona E-verkisto, unu verkon de kiu ni proponas nun al nia legantaro. Bv sendi viajn notojn. Anticipe dankon. Kaj ni daŭre aperigas poemojn de nia E-poeto Gregoro D.* –Joel Bjorling

## Eva Bodin

Eva Bodin estis maljuna virino, kiun mi ofte vidis en la urbo. Ŝi portis grandan sakon, uzante ĝin por kolekti restaĵojn por la hundo. Mi vidis ŝin en la nŭtraĵa butiko serĉantan en rubaĵujo.

Mia patrin vidis ŝin, kiam ŝi, patrino, estis infano. Eva Bodin estis almenaŭ centjara.

Antaŭ nelonge en lernejo mi studis familian historion. Por mi tio estis enua. Mi ne ŝatis ĝin. Ĝi estis tiel longa. Kiel mi povas rememori ĉion?

Sed mi amikino Elizabeto ŝatas historion. Ŝi scias ĉion! Ni iris al la biblioteko fari hejmtaskon: kolekti informon pri la familio. Kiamaniere malŝpari sabaton?! Elizabeto iris labori. Ŝi kopiis liston de lokaj historiaj libroj. Ŝi transskribis paĝojn. Sed mi estis preskaŭ dormanta.

Mi prenis libron de la breto kaj foliumis ĝin. Mi estis laca. Dormema.

Sed atendu, tie estis io tre interesa: la libro enhavis la liston de entombigitoj kaj inter ili – Eva Bodin! Nekredeble! Estis notite: EVA BODIN 1837-1947.

Neeble! Mi ja vidis Eva Bodin-n ĉi matenon. Ŝi ne mortis.

Mi diris: "Elizabeto, vidu! La libro diris, ke Eva Bodin estas mortinta."

"Kiu ja estas Eva Bodin?" – ŝi demandis.

"La maljuna virino! Vi vidis ŝin sur la strato ĉi matene."

"Mi ne vidis ŝin," – ŝi diris denove.

"Ĉu serioze, vi ne vidis ŝin? Ŝi serĉadas nutraĵon por ŝia hundo!"

"Mi ne vidis ŝin," – insistis Elizabeto.

"Ŝi ne estas mortinta!" – mi diris. – "Iru al la tombejo!"

"Pardonu, sed mi estas okupata," – respondis Elizabeto.

"Iru ni," – mi ripetis.

Mi prenis ŝian manon kaj ni ekiris al la tombejo. Ĝi situas je kelkaj kvartaloj de la biblioteko. Ni iris al la malnova sekcio. Tie estis altaj tomb-ŝtonoj. Aliaj tombŝtonoj estis malgrandaj aŭ kadukaj.

Ni marŝis malsupren tra la monteto. Apud la montpiedo estis iu tombŝtono kun malklaraj literoj kaj datoj. Mi aliris pli proksimen al ĝi. La surskribo estis fantastika:

EVA BODIN
1837-1947

Vere, ŝi estas mortinta. Sed poste okazis plua surprizo: apud la tomba ŝtono troviĝis la granda sako.

## Poemo de Gregory S. Dolgin~

Julimatene, kiu varmkaresas,
Al piedmont', al regno de silent',
Al randarbar', ĉu pina aŭ cipresa, –
Alvenu, kien vokas via sent'.

En ombro de smeraldarbara tendo
Aŭskultu kiel spiras verda ter'.
En la kviet' eterna vin atendos
Neelĉerpita fonto de sincer'.

Ĝis nokt' stelplena vi, strangul', vagante
Vin sentos kiel parton de l' Natur'.
Nur Tera saĝ' kaj lingvo de amantoj
Kapablas nin konsoli en obskur'.

Kaj poste, se angoro, aŭ laciĝo
Vin klinos, kvazaŭ herbon frua neĝ', –
Vi rememoru tagon plej feliĉan –
En verda templo sonis via preĝ'!

## Lernu.net atingis 100,000!

Ni kun granda plezuro informas vin pri gravega mejloŝtono por Lernu.net: ĝi ricevis sian 100-milan registritan uzanton! Lernu.net estas unu el la plej ambiciaj kaj sukcesaj projektoj, sponsoritaj de ESF, kaj tiu jubileo estas grandega atingo ne nur por nia fondaĵo, sed ankaŭ por la tuta Esperanto-komunumo. ESF fieras, ke nia financa subteno ebligis la ekeston de tiu ĉi unika kaj plej vizitata Esperanto-retejo en trideko da lingvoj, kun ĉ. 100,000 paĝ-vizitoj ĉiutage, kun pli ol cento da volontulaj lingvohelpantoj kaj tradukistoj, kaj nun kun komunumo de cent mil registritaj uzantoj el 240 landoj!

Fakte, niaj ambicioj jam preterpasas niajn financajn kapablojn, kaj pro tio ni petas vian financan subtenon. Nia fondaĵo ne ricevas monon de ajna registaro, kaj ni dependas de la malavaraj donacoj de homoj kiel vi, kiuj pasie strebas al egaleco kaj plibonigo de komunikado inter la popoloj de la mondo, por daŭre sponsori Esperanto-rilatajn edukajn kaj esplorajn projektojn. –*ESF*

* * *

*Antaŭ kelkajn tagojn mi revenis de Ukrainio, kie okazas vica IJK de E-o. Pri tio legu informon en la aŭgusta numero de "Saluton!" Dankon! Sukcesojn! Ĝis!* –*Araneo*

* * *

esperanto usa




http://esperanto-usa.org

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Julio – naskiĝtago de Esperanto + 67-a IJK'11 en Kijivo

23an de Aŭgusto – la UK en Kopenhago, speciala raporto de niaj membroj kaj amikoj